

Sud-Rejna Kuriero

Majo
2018

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°69

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj,
karaj legantoj,*

Nia asocio akceptis la gravan taskon organizi la printempan staĝon en Buhl apud Guebwiller. La vetero estis printempe agrabla, la etoso estis amika kaj simpatia. Jam aperas raporto de Dieter Rooke.

En februaro okazis nia membro-kunveno kun raporto de Ivo.

*Niaj verdaj fadenoj
daŭre funkcias alterne
en 2 restoracioj eĉ kiam
frostas.*

*Nia asocio ricevis de
Léone Wermelinger
multajn librojn.*

*luj estis venditaj aŭk-
cie dum nia staĝo.*

*Jam novaj rendezuoj
estas planitaj fare de*

Bavelo. Pliaj informoj aperos en nia dissendolisto.

La venonta staĝo estas planita en Heidelberg meze de oktobro.

*Al ĉiuj ni deziras ĝui la someran periodon por partopreni Esperanto-aranĝojn,
kunvenojn, kongresojn kaj feliĉi en Esperantio.*



André Grossmann

Jaŭdo	31.05.2018	Monata kunveno en Grün '80 / Rheinfelden ek de la 17a horo.
Sabate	23.06.2018	Amika Tago en Freiburg
Lundo	25.06.2018	Verda Faden 'Porte de France'
	07/08.2018	Ferioj
Jaŭdo	27.09.2018	Monata kunveno : Babilado
Lundo	29.10.2018	Verda Faden : 'Porte de France'
Jaŭdo	22.11.2018	Monata kunveno : Programo
Sabate	.12.2018	Zamenhofa festo en Germanio

Claudia Adrario

Nicole Béroud

Die Pinguine

Wenn es stürmt am Südpol
stehen die Pinguine ganz nahe beisammen.
Zehnhundertausendmillionen Pinguine.

Ein riesiger Pinguinhaufen.

Die Köpfe mit den Schnäbeln unter den Knopfaugen sind
zur Mitte des Haufens gerichtet.

Damit der Sturm ihnen nicht den harten Eisschnee
ins Gesicht haut.

Sondern nur auf den Rücken.

Der Sturm kommt nämlich von aussen.

Vom Meer her.

Oder übers Eis.

Je nachdem.

Die Pinguine stehen nicht.

Sie watscheln.

Trippeltrippel.



Schneckenförmig drehen sie sich ein und wieder aus.
Die, die grad innen sind, haben's kuschelig und warm.
Sie spüren den warmen Atem der Brüder und Schwestern.
Die, die aussen sind, kriegen den Eisschnee auf den Rücken
gehauen.

Die, die grad ganz aussen sind, denken mit sehnsüchtiger
Gewissheit an die Mitte.

Wo's warm ist.

Die, die in der Mitte sind, geniessen – und wissen, sie müssen
mal wieder an den Rand.

Kein Pinguin hat's immer warm.

Und keiner immer kalt.

Es gibt keine randständigen Pinguine.

Nur immer mal wieder am Rand watschelnde.



La pingvenoj (Claudia Adrario)

**Kiam ŝtormas ĉe l'Suda Poluso,
La pingvenoj kunige sin tenas.
Dekcentmilionoj da pingvenoj.
Grandega amaso da pingvenoj.
La kapoj kun la bekoj sub la buton-okuloj
Alrigardas la centron de l'amaso.
Por ke la ŝtormo per malmola glaci-neĝo
Ne vipadu ilian vizaĝon.
Nur la dorson.
Ĉar la ŝtormo venas de ekstere.
Ekde la maro.
Aŭ tra la glaciejoj.
Laŭe.
La pingvenoj ne staras senmove.
Ili pingven-paŝetas.
Plaĉ' plaĉ' plaĉ'**

**Helikece ili turnas sin enen kaj elen.
Tiuj, kiuj ĵus enas, ĝuas dorloton kaj varmon.
Ili sentas la varman elspiron de la gefratoj.
Tiuj, kiuj staras ekstere suferas pro la vipado de la
glacineĝo.
Tiuj, kiuj ĵus eksteras, pensas kun sopira
certeco pri la centro.
Kie varmas.
Tiuj, kiuj centras, ĝuas kaj scias, ke iam
Ili devos denove iri al la rando.
Neniu pingveno ĝuas daŭran varmon.
Ne ekzistas rande starantaj pingvenoj.
Nur iam kaj iam ĉe l'rando paŝetantaj.**

Asocio Mulhouse-Esperanto Ĝenerala Membro Kunveno la 9an februaro 2018.

Ĉeestantoj: Simone Kiry, Odette kaj Bernard Behra, André Grossmann, Edmond Ludwig, Robert Kueny, Bertrant Wick, Yves Stutz.

Akcepto de la raporto pri la lastjara Ĝenerala Membro-Kunveno.

La raporto estas akceptita unuanime.

Agad-raporto fare de la sekretario. La raporto estas akceptita.

Financa raporto fare de la kasisto.

La raporto montras profiton pro la lastajara staĝo en Colmar. La enhavo estas pozitiva.

Simone rimarkigas, ke mankas donaco je 10€. La kasisto tion korektos por 2018.

La raporto estas akceptita.

La membro-listo evoluas: 6 membroj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, 3 el ili forlasas la asocion pro personaj aŭ sanaj kialoj. Aliflanke 3 novaj personoj ekpagis. La grupo nun konsistas el 14 membroj kaj 4 abonantoj.

Renovigo de la komitato: Finiĝis la mandato de:

André Grossmann

Edmond Ludwig

Simone Kiry

Irène Lemart

André Grossmann, Edmond Ludwig, Simone Kiry estas reelektitaj.

Irène Lemart ne plu membras.

La nova estraro nun konsistas el:

Prezidanto:

Sekretario por la Franca:

Sekretario por la Esperanto:

Kasisto:

Eksteraj rilatoj kaj propagando:

André Grossmann

Robert Kueny

Yves Stutz

André Grossmann

**Simone Kiry kaj
Jacques Pineda**

Asesoroj: Anne vernet, Edmond Ludwig, Bertrand Wick

Kurso funkcias en Espace 110 preskaŭ ĉiu-marde:

Kun unu komencantino kaj du progresantoj

SRK: Refoje la poŝtaj tarifoj altiĝis komence de 2018. Ekestis la demando ĉu refoje altiĝi la kotizon aŭ laŭ propono de la kasisto limigi la nombron de paĝoj al 16 kaj ties pezon al 20 gr. Tiu dua solvo estas akceptita por la enlandaj dissendadoj. Ne estas koncernataj la ekzempleroj al la Bazela Grupo kaj tiuj disdonataj okaze de kunvenoj.

Staĝo en Rimlishof: Nia grupo ME akceptis ĝin organizi en Rimlishof. Jam aliĝis 17 personoj, plej multe el Germanio. Sin anoncis ankaŭ partoprenantoj el Svedio kaj el Nederlando. Andreo petas la helpon de aliaj membroj por organizi la transportan servon kaj eventuale akcepti gastojn pli frue alvenantajn.

Simone, Edmond kaj Bertrand sin proponas.

Biblioteko kaj libroj:

Léone Wermelinger transdonis pli ol 200 librojn kaj revuojn al nia asocio, necesis ilin transporti de Burgonjo al Alzaco. 4 personoj tien veturis la 2an de februaro 2018. Iuj libroj estas tuj akireblaj de membroj. Okaze de nia staĝo ni organizos aŭkcian vendadon, tamen kun limigita nombro da libroj.

La biblioteko de ME ne funkcias malgraŭ listo en nia retejo. Tial eblas provi vendi brokante la ceterajn librojn kaj la librojn de nia biblioteko Verda fadeno:

Okazis regule en Rixheim kaj Saint Louis kun gastoj el Bazelo.

Bertrand (kaj Jacques) havas planon pri informado pri Esperanto. La asocio pretas subteni ilian projekton kaj pagi la elspezojn. Ili proponas fari buĝeton por scii, ĉu necesas ankaŭ peti la subtenon de EFE. La asembleo konsentas pri tio.

Dissendo-listoj:

La listo verda-babilejo ne plu funkcias momente. Oni proponas ĝin nuligi.

La listo de Mulhouse-Esperanto daŭre funkcias, ĉefe por informi la membrojn pri diversaj eventoj. Simone petas sian eksiĝon el la listo.

Estontaj agadoj:

Ekologia Foiro de Ungersheim

Libro Foiro de St Louis.

Diversaĵoj:

Yves informas la asembleon, ke je la venonta membro-kunveno (2019) li eksiĝos de la komitato kaj kompreneble ankaŭ la sekretario-posteno.

Fine de la kunveno, Andreo proponas kuntrinki la amikecan glason.

La sekretario

Ivo Stutz

Frosta Verda fadeno en Saint-Louis



Fine de februaro ege frostis en Alzaco dume en la sudo pluvegis. Benard raportas pri la tiama verda fadeno:

Karaj Gesamideanoj, Malgraŭ la malvarmo la Verda Fadeno ne rompiĝis nek frostiĝis.

Mi promesis al Antoinette la ligojn de la iloj, kiujn mi kutime uzas por traduki en Esperanton aŭ skribi en tiu lingvo (do eventuale la aliaj verdaj fadenuloj povas ankaŭ malkovri tiujn retejojn aŭ ilojn) :
Se vi bezonas, mi povas doni al vi konsilojn por malfermi kaj uzi tiujn ilojn.



Bernard

<http://vortaro.net/>
<http://www.reta-vortaro.de/revo/>
<http://www.kono.be/vivo/>
<https://translate.google.fr/?hl=fr&tab=wT>
<https://languagetool.org/eo/>
<http://www.remush.be/tezauro/>
<http://www.tekstaro.com/>
<https://tatoeba.org/epo/>
<http://static.recantodasletras.com.br/arquivos/4472133.pdf>
<http://bertilow.com/pmeg/index.html>
www.lingvo.org/konvertilo

Nia retejo:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj dissendo-listoj:

mulhouse-esperanto@googlegroups.com

Por babili:

verda-babilejo@googlegroups.com

Niaj Verdaj fadenoj en Rixheim fine de marto kaj en Saint-Louis fine de aprilo

En Rixheim ni kuniĝis la 26an de marto. Fine de aprilo ni estis 11 partoprenantoj por la verda fadeno en Saint-Louis.



La venontaj verdaj fadenoj estas jam planitaj ĝis fine junio. La Amika Tago okazos la 23an en Freiburg.

Ĉu ni planu la komunan manĝon de nia grupo inter la 11a kaj la 16a de junio? Bonvolu fari proponojn al nia dissendolisto.



Jen la kalendaro de venonta verdaj fadenoj.

- ◆ 28an de majo 2018 en Rixheim La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- ◆ 25an de junio 2018 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.

Esperanto-libroj de Léone Wermelinger

Eugène Wermelinger estis aktiva esperantisto en la regiono de Guebwiller kaj Buhl, kie li havis biskvit-firmaon. Post lia emeritiĝo, li translokiĝis al vilaĝo en Burgonjo. Li forpasis la 11an de aŭgusto 2015.

Nia grupo Mulhouse-Espéranto ricevis fine de 2017 inviton de lia edzino Léone Wermelinger transpreni la bibliotekon de ŝia edzo.

Finfine, fine de januaro ni veturis 4-ope al Burgonjo, kie ni estis varme akceptitaj de Léone. Pli ol 200 libroj estis jam metitaj en skatoloj por transportado. Ni plenigis la aŭton de Bernard.

La kolekto de la libroj kaj revuoj estis donacita sen aparta kondiĉo. Ni pripensis pri tiu afero, evidente ni estis povinta konservi tiun bibliotekon, sed tio necesas zorgo, rimedoj, organizo-forto, kiujn ni ne posedas. Do preferindus doni la okazon al la esperantistoj profiti tiujn librojn. Iuj certe estos pretaj, aĉeti ilin kaj samtempe tiel havigi iom da mono al Mulhouse-Esperanto.



AŬKCIADO

Nia grupo jam estis preparanta la printempan staĝon en Rimlishof en Buhl. Tial ekestis la decido organizi tia-okaze aŭkcian vendadon de iom da libroj.

Despli oportuna loko, ke en la jaro 1997 jam okazis tie simila staĝo, dum kiu Eugène prelegis pri diversaj temoj, interalie pri uzo de pendolo.

Kutime aŭkciado de libroj kaj aliaj esperantaĵoj estas agrabla momento dum Esperanto-evento, ĝi ebligas havigi iom da mono al la organizanta grupo kaj donas la eblecon akiri favorkoste malnovajn librojn jam ne aĉeteblajn aliloke.

Por tiu aŭkcio, Bernard elektis aron da interesaj aferoj, kiuj estis listigitaj en la "Staĝo-Libroto". Krome li disponigis detalajn klarigojn pri ĉiu unuopa libro.

Sabate vespere post la koncerto de Anjo Amika, ekokazis la aŭkcia vendado. La publiko estis ege atenta. Ni sukcesis forvendi preskaŭ ĉiujn proponitajn librojn. Ni dankas al Léone kaj amike rememoras pri Eugène.



83a Regiona Staĝo de Esperanto

organizita
de

MULHOUSE  ESPERANTO

En la ferio-centro de
la 20/21/22-ajn de
aprilo 2018



Somero en Printempo
raportas Dieter Rooke el Svislando

De la 20-a ĝis 22-a de aprilo 2018 kolektiĝis 40 verduloj en feriejo Rimlishof, en orienta Francio.

La belega vetero favoris nin per bluega ĉielo kaj varmo somera. Loka Esperantisto, S-ro Edmond Ludwik gvidis nin al vidindaĵoj en proksima urbeto Guebwiller.

En ĝi troviĝas muzeo kun nomo: Théodoro Deck, kiu mem inventis bluan ceramikaĵon.

En vitrinoj staris belegaj ĉielbluaj florzavoj, unu salono montris kahelan banĉambbron kun surpentritaj birdoj.

Unu etaĝo estis dediĉita al la unua kaj dua mondmilitoj; ambaŭ furiozis en la ĉelima regiono Alzaco.

En ĉefa preĝejo videblis portreto de misiisto Andreas Bauer, pereinta en jaro 1900 en Ĉinio, kiel martiro dum la boksista insurekcio. Plej elstare kontribuis al la programo la eminentaj stelulinoj el Esperantio Anjo Amika el Hungario, kaj Spomenka Ŝtimec el Kroatio.



La vendredan Vesperon Anjo kantigis nin per la lingvo por ni, la fluanta tajdo, kaj la apudmoskvaj vesperoj.

Postan vesperon ŝi sole prezentis sian vaste konatan repertuaron. En preĝejo ni aŭdis la "Ave Maria" en latina lingvo. S-ino Spomenka Ŝtimec intereskapte rakontis pri sia verkaro, la kroata milita noktilibro; jam tradukita al kelkaj naciaj lingvoj. Ŝi krome parolis pri la Esperanto-monumento starigita en Zagrebo okaze de la UK; ĉiujn obstaklojn kaj malhelpojn ŝi venkis persiste kaj optimisme. La vivon de Ferdinand Hodler ŝi esploris, ĉar li estis edzo de kroatino. Multaj el liaj pentraĵoj konserviĝis en muzeo de Sarajevo; i.a. portreto de juna Hektor Hodler, fondinto de UEA.

La ĉeforganizanto de la renkontiĝo, S-ro Andreo Grossmann programis aŭkcion de malnovaj Esperanto-libroj.



La unua aŭkciaĵo tamen estis dupaĝa anonco el ĵurnalo "Le monde" reklamo por Esperanto, mendita de japano S-ano Etsuo Mijoŝi.

En la granda libroservo estis aĉeblaj pli novaj libroj; la plej freŝa estis la tria eldono de HEL-historio de Esperanto-literaturo.

Antaŭ enlitiĝo ni frandis lokan bongustan vinon aŭ bongustan Bieron por nur unu eŭro.

Ĝis revido al venontaj staĝoj de Esperanto en aŭtuno en Heidelberg kaj en venonta printempo en orienta Francio.

raportis Dieter Rooke

40a BAVELO-Seminario 84a regiona aŭtuna staĝo

12a - 14a oktobro 2018 – Heidelberg

En Hajdelberg' mi perdis mian koron ... estas konata germana studenta kanto. Pri Heidelberg ne necesas multe diri, jam ĉiuj konas sian famon: la universitaton (plej malnova en Germanio), la kastelon detruitan de la “suna reĝo”, la plej grandan vin-barelon de la mondo (bedaŭrinde malplenan), la faman malnovan ponton trans rivero Neckar ... Kelkajn el tiuj vidindaĵoj ni povos mem spekti dum la sabat-posttagmeza ekskurso.

En la seminario vi povas elekti inter la klasikaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. La bukeda kurso prezentas diversajn interesajn temojn:

- ◆ Kiel plibonigi la komunikadon inter malbon-aŭdantoj kaj bon-aŭdantoj? (Alois Eder)
- ◆ Ruslando estas nia najbarlando (Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio en Ruslando kaj nun prezidanto de Germana Esperanto-Asocio)
- ◆ Germanaj specialistoj en Sovetunio – sekve de la milito (Karl Breuninger).
- ◆ La Demokrata Respubliko Kongo plej riĉa kaj plej malriĉa ŝtato de Afriko – kiel ni rilatas al tiu dilemo (Manfred Westermayer, Alois Eder).

Kursoj:

- A1** komencantoj 1 (Barbara Bertrand)
- A2** komencantoj 2 (Gerold Busch)
- P** paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B** Bukedo kun diversaj prelego-“floroj” de pluraj prelegantoj (detaloj en la supra teksto)
- i** Infanprizorgado por infanoj (2-10-jaraj) (C. Majer, S.+F. Vogler)

Aliĝilon bonvolu sendi al:

inge.simon@esperanto.de
aŭ poŝte al
S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20
DE-73431AALEN
Pagebla per ĝiro al
CCP Esperanto France-Est
1997 72 W Nancy
per franca ĉeko al Esperanto France-
Est sendata al
André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
ret-adreso: andreo.ag15@sfr.fr

DJH Jugendherberge Heidelberg International



Tiergartenstraße 5, 69120 Heidelberg
(Koordinatoj: 49.416039 N, 8.659631 E)
Tel: +49 (0) 6221 651190
jugendherberge-heidelberg.de



Vespere ni povas ĝui du amuzajn programojn kun

Programskemo

vendredo, 12a oktobro

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj

18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo

19:00 - 20:00 kurso – parto 1

ekde 20:15 programo kun Christoph Frank

poste knajpo

sabato, 13a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

09:00 - 11:45 kursoj de ĉiuj niveloj

12:00 - 13:00 tagmanĝo

14:00 - 17:00 ekskurso por ĉiuj: urbo-esplorado

18:00 - 19:00 vespermanĝo

19:00 - 20:15 kurso

ekde 20:30 programo kun Christoph Frank

poste knajpo

dimanĉo, 14a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

08:30 - 09:00 redono de ĉambroj

09:30 - 11:30 kursoj

12:00 - 13:30 tagmanĝo, adiaŭo kaj poste .eblas komune ekskursi al la loka Hajdelberga monto Königsstuhl kun elstara rondrigardo.

Kostoj:

Kotizo: 30 €

(por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Restado en la junulargastejo, kompleta pensiono por 2 tagoj:

en 4-lita ĉambro 95 €

en 2-lita ĉambro 120 €

Aliĝilo

(bv. sendi al: Inge Simon, Brünner Str. 20, 73431Aalen, 07361/360 615, Inge.Simon@esperanto.de)

Mi ĝiras _____ € al BAVELO-Konto
IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22 -
BIC: SOLADES1VSS .

aŭ al CCP Esperanto France-Est
1997 72 W Nancy

Mi partoprenas ...

la kurso A1 / A2 / P / B / i .

Mi volas dormi en ...

2-lita ĉambro ve/sa sa/di

4-lita ĉambro ve/sa sa/di

Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

Manĝoj en la junulargastejo:

	vendredo	sabato	dimanĉo
matenmanĝo	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
tagmanĝo	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>
vespermanĝo	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>

Mi volas vegetarajn manĝojn

Mi volas veganajn manĝojn

Mi havas alergion kontraŭ _____

Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso,

Pliaj rendevuoj en Esperantio

Sabate, la **7-an de julio** kunveno al **flora ekskurso** en la **Danuba valo ĉe Beuron**. Kiu volas, povas jam alveni la antaŭan vesperon kaj/aŭ resti la postan vesperon por komuna tranoktado en la junulargastejo - unike en bizaraj rokoj situanta - **Burg Wildenstein** (pri tiu rava loko vidu <https://www.jugendherberge.de/jugendherbergen/Leibertingen-Wildenstein-114/portraet> (germane/angle)). Renkontiĝejo por la flora rondmigrado: sabate je la 14-a horo ĉe la enirejo de la klostro Beuron.

Bonvolu anonci vin kaj ricevi pliajn informojn ĉe: Inge.Simon@esperanto.de

Amika tago en Freiburg

Ni restos en la urbo Freiburg, detaloj ne jam estas fiksitaj, ni alstrebas jenajn punktojn. Pliaj informoj en nia dissendolisto kaj en nia retejo.

- pikniko
- vizito de muzeeton pri stanaj figuroj
- por marŝemuloj: promenado sur Schlossberg.

KONSTRUADO-kajero 2018


La asocio TAKE ĵus eldonis sian ĉi-jaran eldonaĵon, nome

"Konstruado-kajero de TAKE 2018" Ĝi ampleksas 82 paĝojn kaj estas ĉi-foje tutkolora. La ĉi-jara temo estas "Brikoj".

Ĝi estas aparte mendebla per modesta kotizo je 8 eŭroj ĉe nia kasisto.

Jen la enhavo-listo

Enkonduko
Strata arto aŭ l'arto de grafitiaĵoj
Provizoraj domoj en Japanio post 2011
Kio eblas en konstruado per brikoj ?
Brikaj domoj en Vieno
La katedralo de Wroclavo
Evangelika kirko en Zagreb
Nubianaj volboj
Katalunaj volboj
Katalunaj Volboj PLU
Domoj JAOUL
Disvolviĝo kaj medio
Ekologiaj konstruaĵoj kaj estetiko
Dometoj, ĉu solvo ?
Novaj aldonaĵoj al betono
Hubert AGACHE urbanisto



KONSTRUADO kajero de TAKE 2018



Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
Wintzenheim Francio

Nia Kalendaro 2018

Majo 2018	15 - 22 - 29 28	Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio La Pataterie rue de l'Aérodrome, 68170 RIXHEIM
Junio 2018	5 - 12 - 19 - 25 iam 23 25	Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30. Nia komuna jarfina manĝo en restoracio laŭ proponoj de nia membroj Amika Tago en Freiburg Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2018-2020

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Reta versio (pdf)	Papera versio	Kolora ekzemplero
2018	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2019	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2020	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



**Vintra vetero meze de marto kaj
printempa vetero komence de aprilo**

